

# *Anta? 30 jaroj la forumo de Sao Pa?lo i?is koro de la maldekstruloj*

---



Havano, jul 6 (RHK) Anta? 30 rajoj, la? iniciato de Fidel Castro kaj Luiz In?cio Lula da Silva, kaj la? kunvoko de la partio de la laboristoj de Brazilo, en malfavora kunteksto por la monda maldekstrularo, kaj kiam multaj kredis ke socialismo eniris seneliran krizon kaj rezignis fronte al avanco de novliberalismo kaj la dekstrularo, efektivi?is en Sao Pa?lo, inter la 2-a kaj 4-a de julio 1990, la renkonti?o de partioj kaj movadoj politikaj de Latinameriko kaj Karibio, rebaptita jaron poste kiel Forumo de Sao Pa?lo.

La animo fonda de Fidel konsilis, en ?iu okazo, krei forto-blokon, kaj kunvokis ?iujn batali, ne rezigni meze de la plej grandaj malfacila?oj. Li alparolis en Havano en 1993 al la maldekstrulaj gvidantoj, al la progresema, popola movadoj, al la revoluciuloj transvivintaj tiun epokon, kaj alvokis ilin sin preparo por la unu?i de Latinameriko kaj Karibio.

En 2012, Hugo Chávez parolis per frazo de La Liberiginto Simón Bolívar: “ni sentime metu la fundamentan ŝtonon de la liberiĝo sudamerika, kariba, monda”. Kaj kongrue al progreso de la progresemaĵoj de la regiono, li emfazis la bezonon transiri al nova etapo de konkretaj agoj, defendo de la popola suvereneco.

Poste la ventoj ŝanĝiĝis, kaj ekblovis forte super la nacioj ventoj de novlibera restarigo, kiuj postulis de la kunsido de Sao Paulo rezistemon je ĉiu provo. Ĉi daŝre estis batalfronto, kiu ne devis malaperi, kun Venezuelo kiel decida scenejo.

Okaze de la 30-a jubileo de tiu komuna spaco por defendo de la popoloj, Monikca Valente, ekzekutiva sekretario de la Forumo deklaris al la kuba gazeto Granma, ke “kadre de la debatoj, cerbumoj, spertinteŝanĝoj kaj ideoj de la Forumo de Sao Paulo, ke estiĝis la politikaj kondiĉoj por la politikaj, ekonomikaj kaj sociaj transformoj okazintaj en Latinameriko kaj Karibio en la ĉusa periodo.

“Tie maturiĝis politikaj kaj sociaj gvidantoj, tie fortiĝis la partioj kaj politikaj movadoj kontraŭimperiismaj kaj kontraŭ novliberalaj, tie naskiĝis konkretaj ideoj pri la esenca rolo de la regiona integriĝo.

La Forumo plu estas esenca instrumento por solidiĝo de unueco de la partioj popolaj, progresemaĵoj kaj maldekstraj en Latinameriko kaj Karibio.

---

<https://www.radiohc.cu/eo/especiales/exclusivas/227691-antau-30-jaroj-la-forumo-de-sao-paulo-igis-koro-de-la-maldekstruloj>



**Radio Habana Cuba**